

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

<http://www.iespana.es/esperanto/k59.htm>



N^{ro} 59^a

Julio/septembro 2003

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Juan Antonio Cabezas Martínez,
c/ Jabonerías, 6-3^oD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Sekretario: José Pina Tuells,
c/ St^a Teresa, 22-2^o CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: vakas.

Kasisto: vakas

Redaktoro: Jesuo de las Heras,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marček,
 - 2 **Monato**, de Stefan Maul,
 - 3 **Juna Amiko**, de Geza Kuruez,
 - 4 **Sennaciulo**, de Krešimir Barkovič,
 - 5 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
 - 6 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
 - 7 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Puil,
 - 8 **Litova Stelo**, de Petras Čielauskas,
 - 9 **Liberecana Ligilo**, de Jakvo Schram,
 - 10 **Laŭte!**, de C. Baudé,
 - 11 **La Migrantoj**, de Antje Noordewier,
 - 12 **Juna Penso**, de Vinko Markov,
 - 13 **SLEA-Infomilo**, de P. Persson,
 - 14 **Naturista vivo**, de Ervin Fenyvesi
 - 15 **La verda proleto**, de komitato.
- Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

Pretigas la Kajeron:

Provkorekto: José Pina Tuells,

Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al **konto n°**
2100-4455-71-0200055454. Sen aldona kosto.
La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.



Kovrilo: Jen la strato kaj numero de la kongresejo de HEF62.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la prezidanto	4
Intervjuo al Prezidanto de MSATeH	5
Kara korektingo	7
Excelsior	8
Gilberto	9
HEF 62 ^a	8
Georgo Orüel kaj Esperanto	15
Bonvolu ridi, sed ne tro	18
Gazetoteko Lanti	19
Recenzo	21
La Faraono	22
Statuto de SAT	24

Ne subskribitajn
artikolojn verkas
la redaktoro.

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondiĉe ke
oni citu la
originon.

Ni ne korespondos pri
nepetitaj artikoloj. Tamen,
ni klopodos publikigi ĉiun
artikolon kies enhavo es-
tas interesa kaj ne mis-
traktas tiun ajn
personon.

**Pri la enhavo
de la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem,
ne la redakcio.**

Redaktore

Ni ne venas la unuan de julio, kiel mi intencis, sed fine de aŭgusto pro diversaj kialoj. Dekomence, la sola kongreso, pri kiu mi povus informi, ankoraŭ ne okazis,



fakte ĝi komencis la 15-an de julio, kaj aliajn mi ne povis ĉeesti ĉi tiun jaron. Pro tio, ĉifoje mi nur povas informi persone pri la Kongreso 60-a de la

Hispana Esperanto Federacio. Mi ne povis viziti aliajn kongresojn ĉi tiun jaron, kiel estas mia kutimo, pro diversaj personaj kialoj. Mi esperis, tamen, ke oni invitus min al kongreso de SAT-en-Hispanio cele al informado ĉi tie, sed tio ne okazis ankaŭ, do mi nur povas informi pri tio, kion mi vere atestis, la intervjuon, kiun mi faris al Prezidanto de tiu asocio, S-ro Manuel Parra Benito, krom la Kongreso 62-a de HEF.

Simile, mi sendis petojn tra interreto al kelkaj anoj de SAT, inkluzivante ties Prezidanton, pri resumo aŭ informo pri la Kongreso de SAT en Ŝodofon', Svislando, sed ankoraŭ mi ricevis nenion, krom la Gvidrezolucion kaj Deklaracion kutimajn, kiujn vi trovos en la venontaj paĝoj de nia bulteno.

Notindas la projekto, kiun oni decidis fari dum la Kongreso de VEF en Mursjo, pri starigo de *Gazetoteko Lanti*. Mi esperas, ke vi ĉiuj vizitu ĝin baldaŭ. Pri da informo pri tio en paĝo 19^a. Nur interesas aldoni, ke ĉiu ano de HALE ricevos tiun unuan volumon de la *Gazetoteko Lanti* kune kun ĉi tiu numero de nia magazino. Tio estu premio al fideleco, en tempoj kiam tiom multe da malbonvolo kaj turpa fundamen-

tismo ŝajnas, ke regas la hispanan tiel-nomitan *progresivan* esperantistaron.

Sed estas pli gravaj misfortunoj: du esperantistoj mankos al ni de nun. Oni scias, ke ĉiun tagon esperantistoj mortas laŭ la mondo, kaj ne eblas eĉ raporti pri ĉiuj perdoj, kiujn ni havas; sed tiu du estis notindaj: **Salvador Gumá** estis la plej aĝa esperantisto de Hispanio, kaj li helpis ĉi tiun magazinon, de kiam ĝi aperis dum pluraj jaroj, per sia zorga korektado. La alia mankanto estas **Gilberto Ledon**, franco, kiu loĝis en Brazilo, kaj li estis tre konata en internaciaj kongresoj pro siaj opinioj, publikaĵoj kaj artikoloj. Ci legos pri ili je paĝoj 7^a kaj 9^a.

En ĉi tiu numero ni ofertas al vi aparta donaco memore al lasta kongreso de HEF en la mezaj paĝoj de la magazino. Pro tio, ke ĉiu ano de HALE ankaŭ estas ano de HEF, certe ne estos protestantoj pro tio. Tiuj SATanoj, kiuj kontraŭas HEF ne plu estas kun ni..., ni diru bedaŭrinde. Fakte, tio, ke esperantisto estu kontraŭ esperantisto estas io, kion mi iam eble komprenos...

La eseo monatotria temas ĉifoje pri la rilatoj de Georgo Orŭel kaj Esperanto, je paĝo 15^a, kiujn la aŭtoro de la eseo vidas en la priskribo de la brita aŭtoro pri la Novolingvo. Isabel Acevedo ankaŭ ese-recenzas novan libron pri teruraj eventoj en la malavantgardo de la respublikana Madrido dum la Intercivitana Milito de 1936.

Ĉi tiun fojon ne estis loko por nia kutima ĉapitro de *Enkonduko en muzikon*, kiun ni daŭrigos la venontan numeron. Fakte mi devis elekti inter tio kaj *La Faraono*, kaj mi opinias, ke ci, leganto, dankos pli la ĉapitron de la mastroverko de Prus.

Mi esperas, ke denove plaĉos al vi nia laboro. Se ne, reagu. Se jes, ankaŭ reagu. Estas bele, ke oni diru al ni, ke nia agado estas valora. ☺

La redaktoro

Informoj de la prezidanto

Estimataj Samideanoj!



Unue, je la nomo de la HALE-anoj kaj je mia propra nomo mi devas gratuli tiujn SATanojn, kiuj ne estas

HALEanoj, ĉar ili havas novan propran asocion, kiu luktos per Esperanto en la laboristaj medioj. En la kongreso de HEF (Hispana Esperanto Federacio) ili prezentis al la kongresanaro sian asocion.

Fari asocion estas simple, sed la konstantan laboron, la iluzion de ĉiu tago estas malsimple daŭrigi. Ili devas korektiĝi kaj mi **kuraĝigas** ilin fari tion por plibonigi sian asocion, almenaŭ rilate al du punktoj:

- a. Ili havas sekretan paĝon en interreto. Kial? Kion **oni kaŝas, ke ili bezonas sekretan paĝon en Interreto?**
- b. Ili diras, ke ili estas SATanoj en Hispanio tio estas, ke ĉiu membro de MSATeH estas satano. Sed surprizis nin, ke

la Prezidanto de Maldekstro kaj Sat en Hispanio ne estas SATano!

HALE, progresema asocio, kiu defendas la liberpenson, ne bezonas sekretan paĝon kaj estas malferma al la esperantistaro sendepende de tiu, ĉu oni estas SATano, ĉu ne, sed ne faras dogmon de tio, ke oni devas esti SATano.

HALE laboras sian propran vojon: ni havos la virtualan kongreson en novembro aŭ en Decembro, kie ni petos opinion de la kongresantoj pri kvar punktoj:

- 1 **Ideologio.** Ĉu esti maldesktra estas esti progresema? La spaco de progresema en Hale.
- 2 **Financo.** Ĉu ni devas akcepti propagandon pagotan?
- 3 **Membraro.** Kiujn novajn servojn ni devas fari?
- 4 **Kajeroj.** La estraro de HALE respondos pri **Kajeroj el la Sudo.**

Ĉiam je via dispono,

*Johano Antonio
Cabezas Martínez*

Intervjuo al la Prezidanto de MSATeH

*Mi renkontis S-ron Parra Benito dum la Kongreso de HEF en Valensio. Ne surprizinde, ĉar li estas Sekretario de la Hispana Esperanto Federacio. Mi petis de li, ĉu eblas intervjui lin kiel Prezidanton de nova asocio hispana esperanta, **Maldekstro kaj SAT en Hispanio**, kaj li afable konsentis kaj ofertis ĝin tuj. Mi mem devis pretigi la demandojn, do ni interkonsentis renkonti la venintan matenon, je la kafejo de la Kongresejo. La demandojn li respondis klare kaj rekte, kaj liaj respondoj permesas al ni scii pri la sinteno de la homo, kiu direktas tiun novan LEAon hispanan, kiun ni daŭre ofertas nian kunlaboron de ĉi tie.*

Nun mi intervjuas la Prezidanton de Maldekstro kaj SAT en Hispanio, S-ro Manuel Parra Benito.

Tio estas la 17-a de julio 2003, matene.

Kiam kaj kial vi esperantistiĝis, Manolo?

Ho! Ĉu vi intervjuas Manolon Parran, aŭ la Prezidanton de SATeH?

Ĉu ne estas same?

Oni devas apartigi. Se vi volas havi du intervjuojn...

Nu, fakte la Prezidanto estas Manolo, do unue kiu estas Manuel Parra, kio estas SATeH kaj la rilato inter ambaŭ, ĉu ne?

Do, mi supozas, ke nun vi intervjuas Manolon, ĉu ne?

Jes.

Mi esperantistiĝis en la jaro 1986, en Segovja. Okazis, ke amiko de klubo de montara marŝado konis Esperanton kaj tiam li iniciatis instruadon. Mi aliĝis kaj lernis.

Kial?

Kial? Nu, ĉar Esperanto estas bona ideo por faciligi la interkomunikadon de la homoj.

Ĉu finvenkismo aŭ raŭmismo? Ĉu vi opinias, ke Esperanto havas futuron? Kaj se jes, kia ĝi estos?

Mi pli inklinas al finvenkismo, ĉar la ideo de esperanta komunumo ne tre plaĉas al mi. Fakte jam ekzistas komunumoj diversampleksaj, diverstemaj..., ne necesas ĉi tiu nova komunu-

mo: necesas jam la lingvo. Tial mi pli inklinas al finvenkismo. Tamen, ankaŭ raŭmismoj iel, tiel pravos, ke por ke la lingvo estu funkcikapbla necesas uzi ĝin, kaj por uzi ĝin necesas ĝin kultivi en komunumo de parolantoj, do tiel, iel ili pravos.

Pri la futuro de Esperanto, ĝis nun mi pensas, ke jes: kiam mi pensos, ke ne, vi ne plu trovos min ĉi tie!

Mi ne ĝuste certas pri kian futuron Esperanto havas, kian utiligon far la institucioj, la plurnaciaj organoj de la Eŭropa Unio, eble iuj neregistaraj organizaĵoj, eble iuj movadoj kontraŭglobaligaj..., ian utiligon, mi ne scias kiam aŭ kiam.

Denove persona demando: kion vi faras profesie, Manolo, kio estas via metio?

Profesie nun mi estas meĥanikisto por helikopteroj, kaj pli koncize mi estas funkciulo por la Dirección General de Tráfico¹, kaj mi prizorgas la helikopterojn, kiujn ĝi havas.

Ĉu oni povus diri, ke vi estas policisto?

Ne, tute ne. Mekanikisto ne estas policisto, kaj policisto ne estas mekanikisto! Mi uzas metalajn ilojn, sed ne pafilojn.

De kiam vi deĵoras en HEF?

Mi deĵoras en HEF de la jaro 1995, kiam oni nomis min sekretario.

Ĉu vi atestis gravajn eventojn por Esperanto en Hispanio de tiam? Kaj kiu, laŭ vi, estas la plej grava?

Jes, mi atestis kelkajn. Grava evento estis, ekzemple, la aperigo de la broŝuro **Pro Esperanto** en kvin mil ekzempleroj. Tiu broŝuro estas okdekpaĝa en la hispana lingvo por disvastigi la bazajn informojn kaj argumentojn pri la lingvo internacia. Ĝi estas ilo neperfekta, multaj homoj argumentas kontraŭ ĝia stilo, tamen ĝi estis grava investo, kaj mi opinias, ke bona investo. Es-

¹Ĝenerala aŭtoritato pri trafiko.



Manuel Parra Benito,
Prezidanto de Maldekstro kaj
SAT en Hispanio.

tas aliaj eventoj ne ŝuldataj al mia laboro, sed al alies laboro, sed tiu estas, mi opinias, la plej grava evento, kiun mi atestis.

Ĉu vi havas politikan ideologion? Ĉu vi estas ano de politika partio aŭ sindikato?

Jes, mi membras de antaŭ nelonge en la Komunista Partio de Hispanio. Kaj pri ideologio, pli-malpli jes, ne tre difinita, mi ne havas tre klarajn politikajn ideojn, sed mi klinas al maldekstraj ideoj kaj mi certe neniam voĉodonas al PP, al partio PP, plej ofte al Izquierda Unida². Mi interesiĝas pri politiko, mi legas diversajn ideojn.

Ĉu vi opinias, ke esperantistoj devas esti politike neŭtralaj?

Ne. Esperantistoj estas homoj. Homoj tute ne devas esti neŭtralaj. Ili devas serĉi justecon, serĉi la idealon, serĉi la veron, kontraŭbatali la maljustecon kaj la malveron, do tio estas neneŭtraleco.

Ĉu vi opinias, ke politika inklino povas malutili Esperanton en Hispanio?

Ne. Tamen, la antaŭa demando havas duan parton: ĉu esperantista organizaĵo devas esti neŭtrala? Mi pensas, ke devas ekzisti neŭtralaj esperantistaj organizaĵoj, kaj estas bone, ke ekzistu ankaŭ neneŭtralaj esperantistaj organizaĵoj, kiel la Katolika Esperanta Asocio, ekzemple, kaj multaj aliaj neneŭtralaj. Ĉu la ekzisto de tiuj neneŭtralaj malhelpas al Esperanto? Eble foje ili malhelpas, sed ne malhelpas kiam restas klare, ke tiaj organizaĵoj ne reprezentas ĉiujn esperantistojn.

Ĉu vi estas membro de SAT?

Ne. Mi neniam membriĝis en SAT.

Kial?

Nur ĉar mi membras jam en pluraj esperantaj organizaĵoj: la loka, la nacia kaj la tutmonda neŭtrala organizaĵoj, kaj nun ankaŭ en alia nacia neneŭtrala. Tio jam estas sufiĉe da, kaj mi ne membras en ĉiuj organizaĵoj, kiuj estas por mi bonaj; estas multaj ankaŭ neesperantaj organizaĵoj bonaj kie mi ne membras!

De kelkaj monatoj ekzistas nova asocio, SAT-en-Hispanio, kies prezidento vi estas. Kiaj estas la celoj de SAT-en-Hispanio?

Do nun komencas la dua intervjuo: tiu al la

²Maldekstro Unuiĝinta estas politika aliĝo, kies plej grava partio estas la Komunisma Partio de Hispanio, PCE.

Prezidanto de SAT-en-Hispanio. La celo de tiu organizaĵo estas utiligi praktike la internacian lingvon Esperanton por la klasaj celoj de la laboristaro monda kaj disvastigi kaj instrui la Universalan Lingvon Esperanton en ĉiuj laboristaj kaj progresemaj medioj sen atenti pri iliaj politikaj tendencoj kaj nur konsiderante ilian inklinton al demokratiaj kaj progresemaj ideoj; lernigadi kaj instruadi la membrojn, kaj aliaj sekundaraj celoj.

Kiuj estas la ĉefaj punktoj de la programo de la nuna Estraro de SAT-en-Hispanio?

Ĉu programo? Programo, programo, programo³... Mi ne konas la programon de la nuna estraro de SAT-en-Hispanio. Eble tial ke la nuna estraro estas provizora kaj ĝuste morgaŭ ĝi ŝanĝos, reelektiĝos, ĉu la sama, ĉu malsama, ĉu parte sama aŭ ne, mi ne scias. Do tial la nuna provizora estraro daŭros ĝis morgaŭ, do tial mi ne konas ties programon. [Li ridetas].

Sed vi rekandidatiĝas, ĉu ne?

Ne, mi ne plu kandidatos al la estraro de SAT-en-Hispanio morgaŭ⁴.

Kiaj estas la rilatoj de SAT-en-Hispanio kaj HALE? Ĉu vi antaŭvidas Federacion de LEĴoj en Hispanio?

Mi pensas, ke ne ekzistas rilatoj inter tiuj du asocioj nun aŭ ĝis nun, kaj mi ne antaŭvidas Federacion de ili ambaŭ.



Prezidanto de MSA TeH kun la redaktoro dum la intervjuo.

³Per sia gesto kaj vortoj li memorigas faman kaj karismoplenan gvidanton de PCE Ĥuljo Angita.

⁴Tamen sekvintan tagon li rekandidatiĝis kaj kaj reelektiĝis kiel prezidenton.

Ĉu estas konkreta kialo por tio, aŭ estas nur sinteno, aŭ opinio?

Mi ne scias, ŝajne SAT-en-Hispanio taksas, ke HALE ne plenumas la celojn, kiujn devas plenumi iu laborista Esperanto asocio. Do, tio estas sufiĉa kialo por ne atenti pri tiu asocio, kiu ne plenumas la celojn de SAT en Hispanio.

Vi estas samtempe sekretario de HEF de kelkaj jaroj. Kiom da ili?

Do tria intervjuo kun la sekretario de HEF! De la jaro 1995 ĝis la nuna jaro estas ok jaroj.

Ĉu estas instituciaj rilatoj inter HEF kaj SAT-en-Hispanio?

Ĝis nun tute ne. Ĝis nun la sola rilato estas, ke la bulteno de HEF, **Boletín**, aperigis artikolojn pri la fondiĝo de SAT-en-Hispanio.

Kion vi opinias pri la estonto de SAT?

Mi ne scias, ĉar mi ne membras en ĝi. Mia rilato al ĝi estas nur per la nova asocio, SAT-en-Hispanio, kiu klopodas ligiĝi al SAT. Mi ne scias, ĉu jam ĝi atingis tiun ligiĝon..., eble jam, eble ne. Cetere, pri la estonto de SAT, mi esperas, ke ĝi prosperos, sed mi ne scias ĉu ĝi prosperos aŭ malaperos.

Vi scias, ke estas nova Prezidanto en SAT nun, Jakvo Šram. Ĉu vi konas lin?

Ne persone, sed per legoj de kelkaj retmesaĝoj. Ĉu li estas nova? Mi ne scias, ĉu li estas nova..., eble vi konas lin pli bone ol mi. Mi nur legis de li kelkajn retmesaĝojn, eĉ ne artikolojn.

Do vi ne povas diri ĉu SAT ŝanĝos pro tio, ke estas nova Prezidanto... Ĉu vi konis Ivoŝ, la antaŭan Prezidanton?

Tute ne.

Koran dankon pro via triobla aŭ kvarobla intervjuo, Manolo.

Nedankinde.



La Kultura Semajno de Katalunio

Oktobero de 2003 en Cambrils.



Ni atendas vin.

Kara korektinto



Antaŭ kelkaj monatoj mortis Salvador Guma, centtrijaraĝa. Li estis la plej aĝa esperantisto, kiu vivis en Hispanio, kaj li konis Esperanton de junaĝo. Li verkis multe da rakontetoj en Esperanto, kiel tiu, kiun ni publikigas je la dorso de ĉi tiu paĝo, kie li ridindigas la muzikan konon de vilaĝaj dancantoj.

Sed ni ĉiuj ŝuldas al li la multjaran korektadon de magazinoj, kiel *Kajeroj el la Sudo* kaj *Boletín*.

Li estis progresemlulo kaj estis persekutata pro liaj ideoj dum la Diktatoreco de Generalo Franko.

Antaŭ okdek jaroj, en la tempo de mia juneco, formiĝis en la kataluna vilaĝo Alcover [alko ver'] la plimalpli lertaj pianistoj, kiuj en festaj tagoj dungite iris dangi en la ĝejnulojn de preskaŭ ĉiu najbara vilaĝo. Tiam kaj tie pianludado estis speco de kariero, kies modera profitdono stimulis, pro senmoneco, plurajn junulojn lerni, ekster la elementoj de la muzikteorio, la praktikan aplikadon de eĉ tre malfacila solfego.

Tio estis la semo el kiu burĝonis en la kapo de sepopo da lertaj progresintoj, fondi la orkestretan Excèlsior, kiu pro la vicleco, la spriteco kaj komikeco de siaj konsistigantoj baldaŭ ornamis sin per aŭreolo de bona famo. Tial ĝi estis daŭre alpetata ne nur de katalunaj societoj sed ankaŭ de Barcelona-Radio kaj eĉ de alilandaj festalonoj. La naskiĝo de Excèlsior koincidis kun la 'Jazo', kiu, aperinte inter la negroj en Ameriko cirkaŭ la epoko de l' unua mond milito, vastigis facile tra la mondo kiel vastigis tiu milito mem.

Verŝajne la jazo furoris flume pro la kontrasto kun la gravaj simfoniaj orkestroj, kies membroj, similaj al vivantaj statuoj kun mieno pli serioza ol la pantalonfendo de almuzulo, ne devas permesi al si, ĵurgante al partituro disciplino, persone karamboli nek kaprioli per la muzikaj notoj pli respektindaj ol relikvioj. La Jazo renversis tiun anakronismon kaj planenike kaj intime etendis ligojn de simpatio inter la surpudaj muzikantoj kaj la surparteraĵ interfrotigantoj; mi ne diris dancantoj, ĉar en tagoj de la loka Ĉefa Festo kaj en salono plena de randoj al randoj, same kunpremiĝas la brustoj kiel la ventroj kaj sidvangoj!

Tial la Excèlsior-anoj ne nur ludis la respektivan instrumenton, sed ankaŭ komike grimacis aŭ pantomime mokis iun gravulon, kaj sekve ridigante la publikon ili altiris la sopiran rigardon de pimplinoj ravataj de iliaj uniformoj en kiuj ili prezentis sin kiel generaloj de la nova muzikarĥeo! De tio sekvis, foje, ke iu junulino okulumis senhonte al unu el la orkestranoj, ke li venu al si por dancado. Agraba surprizo! Kiel malsata fiŝeto li ekmordis la hokon kaj li povis senti kontraŭ la brusto la ekscitan aromemanon de sia juna korpo. Baldaŭ dua kuraĝulino imitis la ekzemplon, kaj dua Excèlsior-ano ekmordis ankaŭ la hokon. La ekzemplo plu prosperis ĝis tio, ke sur la podio restis nur la pianisto, kiu kuraĝe kaj ritme plu baraktis kun la klavaro, frapante per

Excelsior

la dek fingroj deknatajn akordojn garnitajn per diesoj, bemoloj kaj bekvadratoj speciale abundaj en tiu ekzota muziko.

Li tenadis la piedon sur la dekstra pedalo por maldampi la freneze surdigan vibradon de la trioblaj piankorpoj. Dume, liaj ne timidaj kolegoj, premate al fraŭlinoj sur la parteroj, provadis per ŝajne sinceraj flustroj miele flataj mordigi sian hokon al siaj ankaŭ ŝajne sinceraj parulinoj!

Festorganizantoj ofte laŭdis la Excèlsior-anojn pro ilia arto, sed tiuj de la blovinstrumentoj, ekzemple la saksofonisto, ne dividis ilian opinion kaj serioze plendis, ke li erare elektis malsangan profesion. *Kompreneble — li diris — oni vidas nur la drolan, la komikan aŭ burleskan flankon de nia laboro, sed ne la insidan toksigon de niaj pulmoj, ĉar ĉie, dum la tagoj de la loka Ĉefa Festo, estas motivo por familia kunsido cirkaŭ tablo abunde garnita per pli kostaj kaj ne kutimaj pladoj. Tiam do, precipe se la odoro de rostaĵo tioklas la nazon, oni mangas trioble pli ol kiom estas necese, kaj ankaŭ ĝiseksece oni trinkas eĉ ne soifante. La lasta tagarango estas la Granda Balo, kiu, etendigante en la nokton, skuas, kirilas kaj iel alambike distilas la trioblan glutitan porcion, estigante malaromajn gasojn, kiuj, ĉu spire, ĉu rukte aŭ pli ofte, ĵes furze libere fluas grandakvante kaj diluigas nevideble en la salonaero, kiun mi plenbusce enspiradas por sonigi la ancon de l' saksofono, kaj la trumpetistoj suĉegas kaj pulme premas pufigante la vangojn ĝis tio, ke la premeco vibrigas la parietojn de la trumpetaj tuboj. Vi povis konstati, ke iliaj vizaĝoj ruĝiĝas kiel orangoj, kaj iliaj okuloj preskaŭ elsaltas. Dum ni per ĝojo vivigas, oni per gasoj nin mortigas!*

Kiel dirite, la Excèlsior-jazo diverĝis de la tradicia muziko per sia strukturo, la oreŝira strideco de la trumpetoj kaj la komikeco de la orkestranoj. Tial, simile je iaj modernaj pentraĵoj pri kies imagita konsisto oni ne povas aserti nepran bonecon aŭ malbonecon pro manko de natura komparilo, la jazo de Excèlsior samakaziĝe estis netaksebla... Kiel juĝi la strangajn akordojn, la melodion — ni diru senmelodion? — kaj la stridan trumpetadon? De tio venis, ke en unu el siaj prezentadoj, la Excèlsior-anoj, ĉiam fidelaj al la partituro, iom post iom por amuzi la dancantojn, ludis komike, iel imitante la ĉirkaŭajn klaŭninojn kaj improvizante ciam, precipe la dika orkestrano Johan', kiu naskiĝis stampite de natura komikeco. Vere, nur per

sia drola rigardo li ridigis plengorĝe siajn observantojn.

Ne estas facile sekvi la matematikan taktan de la bazaj drumo, kontrabaso kaj piano, kaj samtempe agi persone, aparte, sed paralele kun ili, ĝapigante la homan svarmon de la salono. Tial, unu fojon okazis, ke la Excèlsioranoj ludante plene distriĝis, perdis la fadenon, disrompis la komunan sinkronecon, sed tamen ne povis aŭ ne devis halti, kaj sekve, dum unu el ili ludis difinitan punkton, alia jam transludis ĝin, alia ankoraŭ postrestis, kaj unuope ili drivis en maro de neakordaj kaj malkongruaj sonoj.

La drumisto plu batis la tamburegon «Bum, Bum... Bum, Bum...» kaj intertempe frapis la vibran cimbalon «Cim, Cim... Cim, Cim...». La trumpetisto per ondanta «Trattertra» pludis rapidan kaj lautan ad libitum en allegro vivace neniam antaŭe komponitan, kaj la pianisto, timante ke la fuŝego damaĝos la reputacion de Excèlsior, febre klopodadis tute vane remeti ilin sur la ĝustan vojon por eviti katastrofan finigon. Ili plu ludis unuope laŭ sia bontrovo en plena malakordeco kaj oreŝira kakofonio, nesciante kiel aranĝi normalan finon al tiu seĉo de kata orgenajo!

Kiam la pianisto, kiel dirigento konsideris ke venis jam la momento ĉesigi la dancspektaklon, li laŭkutte per piedo ekfrapis la plankon kaj subite ĉesis la sinistira ludo, verŝajne unika en la mondo!

La orkestranoj prave atendis, eble ne ke oni tanu al ili la haŭton, sed eble jes ke oni skandale prifajfu, ke oni krii «For!» kaj eĉ «Bas!» Sed kia surprizo! Anstataŭe etendiĝis tondra aplaŭdado miksitita kun spontanaj «Hura!» kaj «Vivul!» kiel premio al ilia virtuozecco!

Post la balo, la Excèlsioranoj altablifis por refreŝigi la gorĝon. Ĉirkaŭ alia tablo sidis kvar societanoj laŭte interparolantaj:

La unua - «Kion vi opinias pri Excèlsior? Per sia lasta numero, ĝi carme sorĉis min!»

La dua - «Eĉ la negroj mem ne ludas pli kompetente ol ili!»

La tria - «Estas nekredible, ke junuloj tiel klare interplektas la arton kun sia ludtekniko!»

La kvara - «Nu, kie naskiĝis la eminentuloj? Ĉiam en humila vilaĝo, jes, kiel la senkompara Excèlsior de l' vilaĝo Alcover!»

Salvador Gumá

Gilberto.

Mi memoras, ke Gilberto ne plaĉis al multe da homoj. Li ĉiam diris tion, kion li pensis, ĉu ĝis estas konvene, ĉu ne. Ĉu ĝi estas politike, ĉu korekte, ĉu ambaŭ.

Mi memoras, ke li iam eldonis la gazeton «Liberecana ligilo», kaj mi memoras, ke li devis ĉesi fari tion, ne pro mallerteco aŭ netaŭgeco de sia laboro tiel, sed pro tio, ke multaj SAT-anoj objektis al lia maniero gvidi la magazinon. Li tion klarigis en sia lasta numero de tiu gazeto, kies eldono estis tute pagite de li mem. Tio ja estis eleganta adiaŭo.

Min iomete skandaligis la vortoj gilbertaj dum la kongreso de Karlovy Vary, je 1999, kiam oni parolis pri mortokondamnito en Usono, kiu estis ankaŭ SATano, kaj kiun oni nepre devus savi de la koridoro de morto, pro multaj kialoj..., nu inter la unutonaj voĉoj subite estis disonanco, kiam Gilberto diris, ke se Billy Waldon vere murdis, tiel kiel diras la sentenco, ne indas, ke ni bleku pri tio, ke oni mortopunos lin. SAT ne estas por defendi murdistojn aŭ krimulojn, sed por pli pozitivaj aferoj. Tio, kio miris min tiam, ne estis la dureco de liaj vortoj, sed la kuraĝo paroli tute libere kaj kontraŭflue per tiu freŝa trankvileco per kiu li diris tion. Fakte, li defiis tiam la regantan dogmon en tiu kunveno, kaj ne estis akra diskuto, kvazaŭ ni ĉiuj subite komprenis, ke li pravus.

Gilberto ĝentile korektis kaj prikomentis la artikolon pri Hector Villa-Lobos, kiun mi sendis al li antaŭ publikigo en ĉi tiu gazeto. Min surprizis lia modesteco, kiam li protestis, ke li ne estis la plej taŭga persono fari tion, sed tamen li faris.

Kiam ateistoj kunvenis dum la UK de Berlino, Gilberto estis tie. Kune kun sia edzino. Kiam oni komentis kiel ĉiu el ni venis en ateismon, li tute rekte diris, ke li ne venis en ateismon: li naskiĝis atea! Evidente, ni ĉiuj naskiĝis tiel, sed baldaŭ ni forgesis... Necesas esti genio konstati evidentajon, same kiel Njuton konstatis, ke ĉio falas surteren...



Se oni legis la lastajn artikolojn de Gilberto en *Monato*, oni vidis, ke liaj vortoj estas duraj, kaj amuzaj. Se oni legas liajn librojn, oni vidas ŝokajn vortojn: ŝajnas, ke li ne havis tempon esprimi tion, kion li volis, se li devis perdi tempon ĉirkaŭirante la ideon per pli molaj vortoj. Oni vidu, ekzemple, *Zé do burro*, kie eĉ por traduko li ne havis tempon: la libro estas trilingva, france, portugale kaj esperante. Sed ne tradukitaj tekstoj, sed diversaj tekstoj en la aŭaj lingvoj.

Kiam mi kongresumis en Fortalezo, Gilberto portis min al mia hotelo per tiu aŭtomobilo, kie li – verŝajne—perdis sian vivon. Tiu estis la lasta fojo, kiam mi vidis karan Gilberto. Mi ne ŝanĝas mian parolon nun, kiam mi parolas pri Gilberto. Mi ĉiam estis proksime al li, kiel oni povas atesti per miaj opinioj, kaj vivmaniero. Al mi vere mankas li, liaj konsiloj, kaj lia ekzemplo. Mi nun ne parolas aŭ sentas pri li male al tiel, kiel mi faris tiel antaŭe. Ne kamarado, ne samideano, ne kunnaciano, ne kunasocio, ne kunhobianto mia esti li. Li estis, simple, amiko mia.

Mi trovas, ke la plej bona omaĝo al Gilberto, ne estas diri belajn aŭ dolĉajn vortojn pri li, sed kolekti momentojn, kiam mi estis kun li, kaj memori pri tio, kion li diris, kaj kiel li diris tion, kion li diris.

Gilberto sopiris al pli bona mondo. Ni faru ĝin. Dum ke ni faras, kritikado al tio, kio ne estas justa, estu la plej grava monumento al kamarado Ledon.

HEF 62-a

Valensjo estas nun eble la plej esperanta urbo de Hispanio, ĉar multas la eventoj esperantistaj jam okazintaj en tiu bela mediteranea urbo. Ne mirinde, ke sonis ĝian nomon kiel surrogatan kongresurbon por la venonta UK se la malsano gripa de Ĉinio ne solviĝas definitive...

Ni vidas en la foto de José Añó unu el la plej modernaj pontoj de Valensjo, Ponto Calatrava, kiu havas similecon al Urbo de Scienco kaj Artoj, vizitita de kongresanoj la trian tagon de la Kongreso de la Hispana Esperanto Federacio.

La mardon 15^{an} de julio komencis la kongreso je la

10^a horo per la disdono de la dokumentoj. Je la 11:30^a horo estis estrarkunveno de Hispana Esperanto Federacio, sed pro tio, ke ne estis alternativa ago por la neestraranoj, oni permesis, ke ĉiu ĉeestis. Mi profitis la okazon demandi al la estraro, ĉu HEF povas publikigi la hispanan version de *La Defio de lingvoj*, de Klod' Piron', kiun mi finpretigas nun kune kun Ismael Ávila, kiu jam sukcesis prezenti sian portugalan version de tiu libro dum la UK de Fortalezo, lastan someron. Oni respondis, ke oni pristudos la aferon, kaj respondos poste al mi. La ideo estas prezenti ĝin dum la Tutamerika Kongreso en Havano.

Rodrigo Portela gvidis enkondukon en la Hispanan Lingvon, kiun mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti ĉar mi estis en la renkonto de la estraro, kiu ankoraŭ daŭris.

Dum la posttagmezo ni kantis en Esperanto kun Sergio Docal, el Usono, kaj poste vane atendis S-inon Mayrim Sandoval, kiu devintus prelegi pri *La fortoj de revoj*, sed ŝi bedaŭrinde ne aperis. Finfine, je la sesa horo



©Foto Añó

estis la Oficiala Malfermo de la kongreso, momento, kiun prenas la foto, kiun ci povas vidi je paĝo 12-a.

La Kordgrupo *La amikeco* muzikis por ni je la 7^a vespere. Poste, estis la interkona vespero.

Merkrede, estis prelego pri *Yumeiho Terapia masago*, de litova Sigita Staisiumaite, kaj post la kunveno de estraro de HEF kun delegitoj de lokaj grupoj estis la Oficiala Akcepto ĉe la Valensja Urbodomo. Post manĝado oni vizitis la Porcelanfabrikon Lladró, kaj je la 7-a itala ĵurnalisto Giulio Gappa prelegis pri *Televido: ĉu monda danĝero aŭ neŭtrala komuniko?*, kies enhavon oni legos en *Kajeroj el la Sudo* la venontan numeron.

Ĵaŭde, la 17-an je la deka kaj duono, Toño del Barrio (Tonĵo el la Kvartelo) diris prelegon pri Julio Mangada, kolonelo de la armeo kaj esperantisto. Li estis arda esperantisto, sed la preleganto ne parolis pri lia esperanta, sed ĉefe pri lia cetera vivo: Mangada estis framasono, liberala militisto, naturisto kaj spiritisto, krom esperantisto. En procezo kontraŭ strikantoj de Asturio, li defendis la akuzitojn tiom pasie, ke oni arestis lin poste pro tio. Aliflanke, Aranda kaj García Hernández, la kapitanoj, kiuj komandis la Ribelon de Ĥaka je 1930 por alvenigi la Respublikon en Hispanion, estis subuloj rektaj de Mangada. Oni ne scias, kion farintus Mangada, se li estus je sia posteno tiun tagon, sed bedaŭrinde li estis en Madrido, funebrante filineton sian, kiu mortis la antaŭan tagon.

Pli bongustan prelegon ni havis sekve, kiam Aŭgusto Kaskero parolis al ni pri kiel kuiri paeljon, kaj poste Abel Montagut¹ parolis al ni pri sia **Fiasko de la poemo de Utnoa**. Kiel



Abel Montagut¹ analizas la fiaskon de *Poemo de Utnoa*.

legintoj de tiu libro scias, Utnoa estas la konstruisto kaj estro de ŝipo, kiu savas homojn kaj bestojn de pluvego, kiam maro subakvigas tutan teron, laŭ rakonto de Daa-35, eksterterano. Montagut¹ abunde parolis pri sia koncepto pri *fiasko*, kaj kial li konsideris, ke la verko havis *fiaskon* dek jaron post sia apero. Tamen, la sinteno de la preleganto estis tiom humura, ke evidentiĝas, ke li parolis tute ironie, kaj la fiasko ne estis en la flanko de la verko, sed de la legantaro kaj, ĉefe, de la recenzistoj. Por ke ni ĉiuj povus juĝi pli bone, li disvendis kelkajn ekzemplerojn de sia verko duonpreze.

Posttagmeze, ni renkontis je la 4-a horo por diskuti pri **La eŭropo 25-membra**. Interesa aspekto de tiu diskuto estis, ke ne sole estis reprezentantoj¹ de Katalunio, Eŭskio, Hispanio, Litovio, Francio, Usono, Rusio kaj Italio, sed ankaŭ de Sennacio. Mi mem devis preni tiun taskon, ĉar la aliaj sennaciuloj estis tiumomente en la Kongreso de SAT en Ŝodefon¹, Svislando. Bedaŭrinde, ne estis klara konkludo de tiu kunveno, kiu baldaŭ iĝis en plendadon, kaj finis per diskuto inter litovino kaj rusino.

Je la 5-a posttagmeze kelkaj vizitis la Urbon de la Artoj kaj la Scienco, kie Jozefo Anjo¹ prenis la foton, kiun oni vidas je la paĝo 14-a, kaj la aliaj vizitis la urbon private, gvidate de lokaj esperantistoj.

La vendredon 18-an de julio estis Kunveno de la Valensja Esperanto Federacio, en kiu Aŭgusto Kaskero informis pri la agado de tiu asocio, unu el la plej antikvaj de Hispanio, ĉar ties Prezidanto, José Miguel Bernabéu, ne sukcesis veni. La kongreso ĉi jare okazis en Mursjo, kaj venontjare ĝi denove okazos en Kasteljon¹. Poste oni prezentis venontajn kongresojn, kaj novajn librojn de diversaj aŭtoroj esperantistaj; kaj je la fino de la mateno okazis kunveno de la nova asocio *Maldekstro kaj SAT en Hispanio*, en kiu, male al tio, kio okazis dum la kunveno de VEF, nur anoj rajtis ĉeesti. Verŝajne, la unua estas asocio *ad extra* (al ekstero), dum ke la dua estas *ad intra* (al interno). Posttagmeze estis prezento de tiu asocio, MSAteH, je la 13:30. Mi ne ĉeestis pro tio, ke mi ne volis ĝeni la estraron per miaj demandoj, kaj ĉefe pro tio,

¹Kvankam veras, ke neniu voĉdonis, por ke tiuj naciuloj venis paroli nome de siaj koncernaj landoj, veras, ke tiuj personoj estas rezulto de ties kulturo, eduko kaj naciaj sentoj, do vere oni rajtas nomi ilin reprezentantoj.



Solena

Malfermo



La partoprenantaro

ke neniu invitis min, kiel decus de amika asocio, kies rilato al SAT estas komuna, laŭ ties *Konvencio de Gotemburgo*, kiun ni baldaŭ publikigos en nia magazino kiel daŭrigo de la Statuto de SAT, kiun ni regule publikigas de la *Kajero* 50-a.

Je la 17-a horo, ni vizitis la urbocentron. Ni uzis du aŭtobusojn, kiujn la urbestraro metis je nia dispono senpage. La turismaj gvidistoj ne scipovis Esperanton, bedaŭrinde, kaj oni necesis provizi tradukon. Laŭ peto de la Sekretario de HEF mi tradukis samtempe tion, kion nia simpatia gvidistino klarigis al ni, profite al brita kaj litova esperantistoj, sed mi devis rezigni pro la bojkotado de Toño del Barrio, Rodrigo Portela kaj Johano del Castillo, kies riĝeĝaĵoj nervozaj estis vere ĝenaj. Mi demisiis pri tiu posteno antaŭ la sekretario de HEF kaj iris kun la alia grupo, kaj Toño mem devis traduki la gvidantinton, sed ne *samtempe*, sed *sinekve*, pro kio li perdis la fadenon ofte, laŭ miaj raportoj, li ne ĉion tradukis, kaj finfine perdiĝis, do ne plu traduko eblis. Verŝajne estas multe pli facile ridi al laboristo ol labori per si mem.

Je la sepa horo ni ĝuis kantan koncerton fare de la ensemblo *Korpopola Lo Rat Penat*. Je la deka horo vespere estis la tiel nomita *diboĉ-promenado* tra la nokta Valensjo. Vere ĝi ne estis dibocha, sed ni vidis alian vizaĝon de la urbo.

Eble la plej atendata evento en tiu kongreso estis la prezento oficiala de la **Granda Vortaro** de Fernando de Diego. Ĝi estis verko de unu homo, sed laboro de kelkaj plu, kiu penas por tio, ke la vortaro aperu: Antonio Valén, kiu vizitis la aŭtoron plurajn fojojn, Mihaelo



Gutiérrez Adúriz, kiu faris interesan komikan enkondukon per moderna fabelo por ni, kaj multaj aliaj, kiuj helpis korekti kaj komposti la vortaron, kaj kiujn mi pardonpetas ne citi ilin ĉi tie. Finfine venis la momento, kiam la antaŭmendintoj povis meti niajn manojn en la verko. Kvankam mi recenzos ĝin la venontan numeron, mi ne povas ne diri nun, ke oni ne devas erari pri ĝi: ne temas pri vortaro de Esperanto, sed de la hispana por esperantistoj. Oni ne nepre uzu ĝin por scii, kiel oni diras konkretan vorton en Esperanto, sed por kontroli, kion tiu ĉi vorto hispana, kiun oni ne komprenas, signifas en Esperanto. La aŭtoro fakte proponas multe da neologismojn en Esperanto por tiu grava verko, sed tio, laŭ mia kompreno, estas granda utilo, eĉ se oni ne adoptas tiun neologismojn, ĉar ili helpas nehispanon kompreni nian lingvon pli bone. Kaj al ne malmulte da hispanoj!

Je la kvara horo posttagmeze, okazis kormola omaĝo de verkistoj al Mihaelo Gutiérrez Adúriz, kiu, ili diris, helpis ilin en iliaj karieroj verkistaj esperantaj. Oni publikigos memorlibron en interreto, kaj ĝi estos senpage, plena de artikoloj kaj noveloj de diversaj aŭtoroj dediĉitaj al omaĝoj, al kiu oni donis supaperan version.

Poste estis konkurso gvidata de Toño del Barrio, kaj je la 7-a, la Solena Fermo de la Kongreso. Kiel *postkongreso*, ni havis la ŝancon ĝui spektaklon pri aragona hoto fare de la Grupo Aragón. La speklo estis bona kaj vigla, kiel atestas la malfacileco, kiun mi havis preni foton por vi.

Mi esperas, ke plaĉas al ci, leganto, la rakonton, kiun mi faris pri la kongreso de HEF. Mi klopodis trovi artikolojn pri tiuj de SAT kaj de UEA, sed mi ankoraŭ ne sukcesis. Venontnumere, se mi sukcesis, vi legos ilin ĉi tie.



Eseo Georgo Orüel kaj Esperanto

Kiam Erik Blea^{noto}, plej konata laŭ sia pseŭdonomo Georgo Orüel verkis **1984**, li ne povus kredi, ke lia novelo, kontraŭmarksisma de maldekstro, sed vere kontraŭtotalitarisma kaj aldeksra kaj almaldekstra, estos tiom sukcesa, kaj akceptata de intelektaj etosoj, kaj ke ĝi estos filmigita de Majkel Radfod kaj aktorigita de Riĉard Barton kaj Ĝon Hart.

La novelo, tre aktuala nun, alportas multajn temojn, kiel duoblan lingvaĵon (uzata en la nuntempo de politikistoj de ajnaj tendencoj), la ekziston de Granda Frato, pardon da seksemo kaj uzon de seksa subpremado kiel eron por kontrolo de individuo, uzon de televido kiel instrumento por kontrolo, same kiel helikoptero, televidaj militoj (ankaŭ nuntempe), la Simptomaro de Estokolmo, kajtiel plu. Sed la celo de ĉi tiu studo estas lingvo, kaj ekzakte la rilato inter *Novlingvo* kaj Esperanto, ĉar danke al lingvo homaj estoj povas disvolvi inteligenton, malsame al aliaj specoj, kies ADN estas same kiel tiu nia je 99'99 procento.

Unu el la bazaj trajtoj en la novelo **1984** estas la laboro de Ŭinston Smis', kiu konsistas el antaŭigo de vero per alia vero, dum ke la laboro de alia kamarado lia, Simo, konsistis el detruado da lingvo kaj konstruado de *Novlingvo*, kies sukcesojn oni festumis kiam la diversaj eldonoj de la vortaro havis malpli da vortoj ol la antaŭa. Ĉu Esperanto influis je la konceptado orŭela de *Novlingvo*?

Ni komencu dirante, ke Esperanto riĉigas, lingve, la civitanon, kiu studas ĝin, ĉar iel ĝi devigas la studanton restudi sian propran lingvon.

Orüel opinias, ke *Novlingvo* fakte estas lingvo *inversa*, ĉar anstataŭ riĉigi individuon per kreskigo de lia inteligento pro tio, ke li

^{noto} Tiujn nomojn, kiuj ne havas tradukon en Esperanto, ni notas ĉi tie laŭ iliaj sonoj. Je la fino de la artikolo estos ŝlosilo pri ili por anglingvanoj, kaj ankaŭ la ceteraj notoj de la artikolo.

uzas pli da fonemoj kaj leksemoj, la kamaradoj priskribitaj en **1984** estas devigataj al senriĉigolingva. Tial individuo estas malpli riĉa eĉ por elekti vortojn ĉar simple en la estonto ne estos vortoj.

*Vi ne ŝatas Novolingvon. —diris Simo malĝoje— Eĉ kiam vi skribas, vi daŭre pensas en la malnova lingvo. Mi legis kelkajn aferojn, kiujn vi verkis por **Tempoj**. Ili estas tre bonaj, sed ili estas nur tradukoj. Funde de via koro, vi preferas la malnovan lingvon kun ĉiu ĝia dubesenco kaj senbezonataj nuancoj semantikaĵoj. Vi ne sentas la belecon de detruo de vortoj. Ĉu vi ne scias, ke *Novlingvo* estas la sola lingvo en la mondo, kies vortprovizo malkreskas ĉiun tagon?*¹

Orüel estis ano de POUM dum la Hispana Intercivitana Milito de 1936, kaj tial li suferis je sia propra karno la detruon de penso, kiam maldekstro ŝtalinimsma uzis duoblan lingvaĵon por detruo POUM per siaj akuzoj pri faŝismo kaj, aldone, nia aŭtoro ne mortis en tiu purigado ĉar lia edzino savis lin. Tial oni ne miru, ke li forte defendas la eblecon pensi malsame.

Sekve, Orüel prezentas kamaradon Simon kiel konvinkitan partianon kaj sen kapablo kritika, kaj insistas, fronte al libera penso, kiun Smis' reprezentas, kiam li diras: *Ĉu vi ne vidas, ke la celo de Novolingvo estas limigi la atingon de penso, mallargigi la agan radion de menso? Je la fino, ni malebligos iun ajn pensan krimon. Fakte, kiel povos esti tia krimo, se ĉiu koncepton oni esprimas klare per ununura vorto, unu vorto kies signifo jam decidis rigore, kaj ĉiu signifo sekundara eliminata kaj forgesita por ĉiam? Kaj je la dekunua eldono ni venas proksime de tiu idealo, sed ĝia perfektigado daŭros multe da tempo post kiam vi kaj mi jam mortis. Ĉiun jaron estos malpli da vortoj kaj la radio de ago de konscio estos pli kaj pli malgranda.*

Kompreneble, ankaŭ nun ne estas justigon ian ajn por fari pensan krimon. Sufiĉas memdisciplino, kontrolo pri realo. Sed venos tago, kiam eĉ tion oni ne bezonos. La Revolucio estos kompleta kiam lingvo estos perfekta. Novolingvo estas lngsos kaj lngsos estas Novolingvo— li aldonis mistikfiere —Ĉu neniam venis en vian kapon, Ŭinston, ke plej malfrue ĉirkaŭ 2050 eĉ ne unu homo povos kompreni konversacion tian, kiel ĉi tiu, kiun ni nun kunhavas?²

Simo estas kamarado kun nenia kritikokapablo, nenia memestimo, individuo, kiu jam rezignis sian individuecon por iĝi kreskaĵon de politika partio nomumita Ingsoc, la partio politika, kiu diras tion, kion oni devas fari, tion, kion oni devas pensi, senti, manĝi, dormi, kaj tiel plu. Nu, kiel oni atingas lingvan obeon, kiel oni konstruas Novolingvon, la lingvon, per kiu individuoj pensos por ĉiam sian kapablon pri pensi kaj songi ĉar penso kaj songo estas krimo mensa, mensokrimo? Kompreni la meĥanisman postulas, ke oni pensu pri Esperanto.

En Esperanto baza ideo estas, ke individuo konstruu sian propran vortprovizon kaj povu konstrui vortojn per racio, ekzemple la prefikso *mal* signifas la kontraŭo de, tial se mi konas la vorton *bona*, aldonante la prefikson *mal* mi kreas koncepton *malbona*. Jen la modelo, kiun Orŭel prenis de Esperanto. En 1984 Orŭel metas sur la buŝo de kredanto Simo, defendanto de Novolingvo, ekzemplo pri *bona*, kiam li diras: *detruado de vortoj havas grandan belecon. Kompreneble, la ĉefaj viktimoj estas verboj kaj adjektivoj, sed ankaŭ estas centoj da nomoj, kiujn oni povas maluzi. Ne temas nur pri sinonimoj. Ankaŭ antonimoj. Vere, kiun ĝustigon havas vorto, nur pro tio, ke ĝi estas la malo de alia?* Ĉiu vorto havas sian malon en si mem. Ekzemple, ni prenu *bona*. Se vi havas tiun vorton, kial oni bezonas la kontraŭon, malo? **Nebona** funkcias same, eĉ pli bone, ĉar ĝi estas ekzakte la malo de bona, kaj ne la alia. Aliflanke, se

oni volas plifortigi la vorton bona, kiun sencon havas tiuj konfuzaj kaj malutilaj vortoj excelente, espléndido kaj aliaj similaj? Plusbona sufiĉas por diri tion, kio estas pli bona ol bona, kaj **Dobleplusbona** funkcias perfekte por pligrandigi la gradon da boneco. Ĝi estas perfekta superlativo. Mi scias, ke oni uzas tiujn formojn, sed je la fina versio de Novolingvo oni malestigos la ceterajn vortojn, kiujn oni ankoraŭ uzas kiel samvaloraj. Je la fino, ĉio relativa al boneco povos esti esprimita per ses vortoj; sed reale, nur per unuj. Ĉu vi ne sukcesas vidi la belecon, kiu estas en tiu afero, Ŭinston? *Nature*, la ideo estis de Granda Frato— li aldonis post li pensis iomete”³.

Kial Orŭel havis tiun intereson pri lingvo? Krom lia metio, verkisto, kiu devas lin zorgigi kaj konigi lingvon, Orŭelon influis la duobla lingvaĵo uzita de maldekstro dum la Hispana Intercivitana Milito, same kiel la penetrado de ideoj politikaj en literaturon ĝis tiu punkto, ke en sia **La landolimoj de arto kaj propagando**, li diras, ke *nur kelkajn jarojn pli malfrue ni trovas kritikiston marksistan, Edvardon Apiidon, kiu asertas, ke libroj estas bonaj nur se ili alproksimiĝas al marksismaj ideoj*⁴. Tiu zorgo de Orŭel pri la venomigado politika de literaturo prenis lin pripensi la bezonon krei novajn vortojn, sed rifuzante la metodologion de Esperanto por kreado de vortoj.

Nun ni devas respondi al grava demando: kiam Orŭel konis Esperanton? Li konis la esperantistan etoson de la periodo inter la du mondostilitoj profunde, ĉar lia onklo Lesli Limuzin⁷ vivis en Parizo kun Eŭĝeno Adamo. En la biografio de Orŭel, kiun Miĥaelo Ŝelden⁵ verkis, li difinas Adamon kiel *socialiston kaj esperantiston faman, kiu, je la komenco de tiu jardeko (la dua) fondis la Sennaciecan Asocion Tutmondan (SAT), kies celo estis promocii Esperanton keil ilon por atingi pacon en mondo, konsiderinte, ke naciismo malaperos kiam la tuta mondo parolos*

nur unu lingvon. Kiam Blea venis en Parizon, la organizacio jam havis ses mil membrojn, kaj Adamo mergis en ideologian batalon preskaŭ konstantan kun konkurantoj, kiuj promociis aliajn universalajn lingvojn. Adamo, kiu ankaŭ verkis kun kaŝnomo Lanti, fanatikis Esperanton tiom multe, ke ĝi estis la sola lingvo, kiun oni parolis en lia domo.

Orüel vizitis ofte sian onklinon, kaj pro sia intelektokaopablo kaj kondiĉo verkista, li alportis intelektecon al intelekta hejmo, kaj do temoj pri literaturo kaj politiko estis temoj normalaj por konversacio inter Orüel kaj onklino kaj Lanti. Eblas, ke tiu hejmo, kie Esperanto estis la sola lingvo uzata, Orüel estis premata lerni Esperanton, sed li estis kontraŭ Esperanto, ĉar li diris, ke *se iam oni adoptas lingvon kiel duan lingvon, estas tre malfacile, ke ĝi estos artefarita lingvo.*

La kontraŭstaro de Orüel al artefaritaj lingvoj estas fronta. En sia artikolo de 1940 titolita *Kial mi verkas?*⁶, Orüel diras, ke *lingvoj nur povas evolui malrapide, kiel floroj, oni ne povas tranĉi kiel maŝinpecoj. Ĉiu ajn lingvo farita estas lingvo sen temperamento kaj sen vivo. Ni rigardu Esperanton, ekzemple. La signiĝo kompleta de vorto estas en siaj asocioj malrapide akiritaj.*

Alia artefarita lingvo de la jarcento 19-a estis Volapük, kiun Esperanto anstataŭis. En tiu artikolo Orüel mencias Volapükon kiam li skribas *ni supozu, ke miloj da personoj kun la tempo, talento kaj mono bezonataj kompromitas fari aldonajojn al la lingvo; ni supozu, ke ili sukcesas veni al interkonsento rilate al kelkaj novaj kaj necesaj vortoj; ili devus atentĝi, tamen, kontraŭ la produkto de simpla Volapük, de artefarita lingvo, kiun oni ĉesas uzi preskaŭ je la momento, kiam oni kreis ĝin.*

Lanti estis la animo de SAT kaj li kreis kompletan ideologian fluon en la esperanta movado, konita kiel *lantismo*. Lanti mem estis libera spirito, je tiu punkto, ke li diris, ke li

estas franca ĉar la sola francaĵo, kiu utilis al li estis franca pasporto.

Kiam Orüel revenis en Anglujon, lia onklino Lesli trovis postenon por li en librovendejo, kies posedantoj estis esperantistoj *lantistile*, ĉar gesinjoroj Ŭestrop estis tipikaj esperantistoj: civitanoj kun spirito libera kaj grandaj libroamantoj.

Tial, Orüel konis Esperanton, sed li uzis ĝin male, en **1984**.

*Juan Antonio Cabezas Martinez
Prezidanto de Hale.*

Notoj.-

¹ Orwell, G.: 1984 Eldonejo Destino, eldono de 1979, paĝoj 60-61.

² Orwell opus cit paĝo 61

³ Orwell opus cit paĝo 60

⁴ Orwell, G.: Escritos (1940-1948) Literatura y politica, ediciones Octaedro, paĝo 66.

⁵ Sheldon, M.: George Orwell.

⁶ Orwell, G.: Escritos (1940-1948) Literatura y politica, ediciones Octaedro, paĝo 20.

⁷ Ŝlosilo por angloamantoj:

George Orüel	George Orwell
Erik Blea	Eric Blair
Majkel Radford	Michael Radford
Riĉard Barton	Richard Burton
Ĝon Hart	John Hurt
Ŭinston Smis'	Winston Smith
Simo	Symes
Eŭĝeno Adamo	Eugène Adam
Mihaelo Selden	Michael Selden
Ŭestrop	Westrope
Lesli	Leslie



Bonvolu ridi..., sed ne tro!

Ĉinumere ni retrovas nian sekcion "Bonvolu ridi, sed ne tro!", kiun mi mem prizorgos. Sed ni estu duonserioza unue, kaj ni lernu iom pri historio:

Leciono pri Usona Historio

La unuan klastagon en Usono, instruistino enkondukas al sia klaso novan infanon, Suzuki, filo de japana entreprenisto. La instruistino diras al la infanoj:

—Ni komencu memorante iom da usona historio: Kiu diris, *Donu al mi liberecon, aŭ donu morton al mi?*

Ĉiuj infanoj silentas, sed subite diras Suzuki:

—Patrik Henri, je 1775.

—Tre bone! Nu, kiu diris *Rego de popolo por popolo; la popolo ne devas malaperi de la surfaco de la tero?*

Denove neniu respondo en la klasĉambro, krom tiu de Suzuki:

—Abrahamo Lincolno, 1863.

La instruistino, mirante, diras:

—Infanoj, vi devus honti. Suzuki, kiu estas nova en nia lando, scias pri nia historio pli ol vi.

La instruistino aŭdas duonvoĉon, kiu diras *Je la merdo malbenataj japanoj!*

—Kiu diris tion?— furioze demandas la instruistino.

Denove Suzuki levas sian manon, kaj diras:

—Generalo Mc Arthur, 1942, kaj Lee Iacocca, 1982.

La klaso mutiĝas, kaj unu el la infanoj diras:

—Mi vomontas.

La instruistino reagis akre al la nespektema infano:

—Ja sufiĉas! Kiu diris tion?

Kaj Suzuki diras:

—Georgo Buŝ, patro, al Ĉefministro japana, 1991.

Alia infano, furioza, krias de la malantaŭa parto de la ĉambro:

—Suĉu tion!

Suzuki, preskaŭ saltante el sia seĝo, diras al instruistino:

—Bil Klinton al Monika Levinski, 1997.

La klaso furoras. La instruistino svenas. Venas ĥaoso. Dum ke, la infanoj venas ĉirkaŭ la svenita instruistino, unu el ili ekdiras:

—Merdon!, mi neniam vidis katastrofon kiel ĉi tiun. Se oni demandas, mi ne kulpas pri tio.

Kaj Suzuki tuj respondas:

—José María Aznar, la 19-an de decembro de 2002, kiam li vizitis Galisjon.



Gazetoteko Lanti

Dum la lasta Kongreso de VEF en Mursjo oni decidis starigi *Gazetotekon*, tio estas, virtualan ejon, kie ĉiu esperantisto povu trovi malnovajn magazinojn en Esperanto. Nun la tuta kolekto de **Kajeroj el la Sudo** jam estas en nova virtualebla formato, PDF, tio estas, *Portable Data Format* aŭ formato por datumajoj portebla, legebla per *Acrobat Reader*, kiun oni povas akiri senpage de <http://www.adobe.com>. Per tiu programo oni povas vidi la magazinon sur la ekrano de la komputilo, aŭ printi ĝin kaj havi ekzempleron surpaperan kun tiom da kvalito kiel la originalo, kiun anoj de HALE ricevas ĉie en la mondo.

Nun mi klopodas trovi sufiĉe malmultekostan aŭ tute senpagan sidejon en Interreto por loĝigi la dokumentojn. Sed ankaŭ ekzistas alia maniero havi la magazinojn: sur kompakta disko, kiun mi povos sendi al petontoj. Tiu alia maniero havas sendokoston kaj ankaŭ la diskoj kostas monon, do ni decidis, ke ĉiu disko kostos 15 eŭrojn. Tio ne estas multe, se oni konsideras, ke en unu sola disko oni povas havi la tutan kolekton de **Kajeroj el la Sudo** (59 numerojn), kaj ankoraŭ estos loko por iom da muziko. Tamen, se ĉi,

leganto, opinias, ke tio estas tro da mono, kaj vi deziras havi ekzempleron de nia gazetoteko, vi povas elŭti ĝin de tiu senpage ejo kaj poste fari la diskon vi mem, aŭ igi amikon fari tion por vi. Ne gravas gajni monon per tio, gravas disvastigo de nia gazetoteko. Tiuj, kiuj mendos la diskojn de ni sciu, tamen, ke vi helpas nian asocion en sia agado.

Aliajn numerojn de tia virtuala kolekto ni dediĉos al **Boletín**, la bulteno de la Hispana Esperanto Federacio, al **Esperanto**, tiu de la Universala Esperanto Asocio, kaj **Sennaciulo**, la bulteno de SAT.

Ĉi tiu tasko enhavas multe da laboro, teda, ripetiga laboro, sed mi opinias, ke la afero indas, kaj samideanoj dankos en la estonto, kiam la surpaperaj versioj jam elĉerpiĝis. Nun mi bezonas scii ĉu vi, legantoj, konsentas pri tio, kaj dezirus esti inter la unuaj, kiuj ricevos la magazinon en la nova formato.



Ni nomumis la virtualan gazetotekon **Lanti** honore al Eŭĝeno Adam, plej konata inter ni per lia pseŭdonomo, *Lanti*, kiu devenas de la francaj vortoj *L'* (la) kaj *anti* (kontraŭ). Ni ĉiuj scias, ke li fondis SAT-n en la dudekaj jaroj de la lasta jarcento, kaj li estis unu el la unuaj —se ne la unua— homoj en maldekstraj etosoj, kiuj kontraŭis malkaŝe komunismon tiel, kiel li konis ĝin en Sovetunio. Li vojaĝis tra la tuta mondo, kaj vivis en Japanio dum kelke da tempo. Poste, kiam tiu lando eniris la Duan Mondmiliton, li translokiĝis al Meksikio, kie li mortis per sia propra mano.

Lanti estis novigulo, fakte, li pledis por granda vortaro de Esperanto, kaj pro liaj klopodoj oni komencis la laboron kompili ĝin, kaj fakte SAT eldonis ĝin—same kiel ĝi faras en la nuntempo. Ni povas diri, ke la Plena Ilustrita Vortaro estas heredaĵo, kiun Lanti lasis al ni. Sed li verkis multe da leterojn kaj artikoletojn, kiujn SAT eldonis kaj oni povas trovi ĉe niaj libroservoj, danke al kiuj ni konas lian penson tre bone.

Li verkis korĉarman libreton, **Sennaciismo**, kiun ni ĉiuj devas legi aŭ relegi. Des pli ĉar la kondiĉoj, kiuj igis lin verki ĝin, ankoraŭ minacas nian socion, male al tio, kio okazas pri **La Kapitalo**, de Karlo Markso, aŭ **La Biblio** mem.

Lanti fidis je *sinergio*, tio estas, la atingo de multaj homoj, kiu estas pli granda kaj valora ol la aldono de la atingoj de ĉiuj tiuj samaj homo sendepende. Pro tio li fondis SATn, kiel organizo ne por Esperanto, sed per Esperanto: oni uzu ĝin por atingi niajn

celojn. La etoso de SAT estas progresiva, sed ne necese maldekstra, laŭ ties statuto. Eble pro tio, kion li vidis en Sovetunio, en tiu Statuto oni pledas kontraŭ dogmo ĉia. Estas klare, ĉiel ajn, ke SAT estas **kleriga** asocio por laboristaro.

La ideo, tial, pri tiu gazetoteko estas, ke mil kaj unu da bonaj ideoj, kiujn bonaj kaj malpli bonaj esperantistoj jam prilaboris kaj fiksis per siaj artikoloj de ili publikigitaj en multaj magazinoj niaj, ke ili ne perdiĝu.

Kiam nova esperantisto venas en nian etoson, li kaj ŝi ofte sopiras al bona magazino, al bonaj artikoloj, kie oni povas vidi kiel oni uzas bonan Esperanton —eĉ se fojfoje oni ankaŭ havas alrigardon al ne tiom bona! Nu, de kiam nia gazetoteko jam enradiĝis inter ni —ĉu retalirebla, ĉu mendebla—, plenumi tiun sopiron scivoleman ne plu kostos monon, aŭ almenaŭ ne tiom da mono kiel iam kostis, kaj multe pli da homoj enriĉiĝos per uzo kaj ĝuo de Esperanto, kaj tio ankaŭ okazigos aperon de novaj kaj bonaj artikoloj por iel reciproki la

gazetotekon.

Mi esperas, ke vi vizitu kaj ĝuu la *Gazetotekon Lanti* ofte, kaj ke per via agado, nia gazetoteko efikos kaj utilos al disvastigo kaj plibonigo de Esperanto.

*La redaktoro
kaj kompilanto*



Lanti


 Recenzo

La ĉekoj¹ de Madrido

La respublikanaj karceroj malkovritaj

La lasta libro de César Vidal prezentas al ni novan, senmetaforan, aspekton de la *Klasbatalo*. Oni vere dezirus havi argumentojn kontraŭdiri tion, kion oni legas, sed bedaŭrinde, ne temas pri veneniga dekstrulo, kiu verkis libron por fifamigi maldekstron, sed pri historiisto, doktoro pri historio en du landoj, Hispanio kaj Usono, kaj li zorge prezentas la fontojn, kie li trovis tiujn datumojn, kiujn li prezentas al ni. Evidente, la interpreto de la faktoj povas esti diversa, sed tamen lia prezentado lasas malmulte da loko por interpretado: je la fino de la libro, ekzemple, oni povas legi la nomojn de la 11 705 personoj, kiujn oni murdis en karceroj kaj ĉekoj je la lastaj jaroj de la Dua Hispana Respubliko. Tiu cifero estas timiga, se oni komparas al la tuta kvanto de mortkondamnitaj ne en Hispanio, sed en multe pli granda lando, Rusio, dum la tuta jarcento 19-a fare de fiaj caroj, kiuj entutis nur 6 321. César Vidal uzis la arĥivojn ekssovietajn, kiujn oni jam deklaris en Rusio ne plu sekretaj, por klarigi la rolon de sovietaj agentoj kaj hispanoj, kiel, ekzemple Santiago Carrillo, kiu poste estis gvidanto de Partio Komunisma de Hispanio, en demokratiaj tempoj.

Mi sciis, ke dum kaj tuj antaŭ la Hispana Intercivitana Milito oni abunde murdis homojn, sed tio, oni asertis al mi, *okazas ĉiam en militaj tempoj*, kaj ankaŭ la *alia flanko* faris tion, *eĉ multe pli kvante*. Finfine, oni diris al mi, la *kaŭzo* de maldekstro estas pli altvalora, pli bona, ĉar temas pri plibonigo de kondiĉoj de laboristoj, kaj sekve de socio, dum ke tiuj, kiuj kontraŭas tion nur volas monon, kaj ilia avido por mono kaŭzas multe da mizero kaj malfeliĉo en la mondo, kaj tion oni faris de ties komenco...

Tamen, la plej terura aserto de la libro estas, ke la tiel nomita **revolucia justeco** legitimas sin mem, do neniu kontraŭstaris, kiam en la respublikana Hispanio milicano arestis piediranton, kaj prenis lin aŭ ŝin en torturejon, demandadis lin aŭ ŝin, kaj pafmortigis lin aŭ ŝin. Poste, li vizitis la hejmon de la mortinto por rabi la riĉaĵojn, kiujn la kompatinda havis dum ke li aŭ ŝi vivis. La krimo? Havi krucon, foteton religian, medalon aŭ ion ajn, kiu pravas, ke li aŭ ŝi estas katolika, aŭ havas multe da mono, kaj sekve estas burĝisto.

Sed ne sole surstrate ili prenis viktimojn: oni ankaŭ forprenis ilin el karceroj mem, ĉar neniu povis kontraŭstari **revolucion justecon** sen per tio sindeklari *kontraŭrevolucia*, kaj sekve mortopunenda.

Tiujn faktojn, oni diras, *kaŭzis ekstremuloj, kiuj ne komprenis bone la idealojn revoluciajn*. Sed la libro komencas priskribante la eventojn de Rusio en 1917 al 1918, bazite de historiaj dokumentoj kaj atestoj, kaj pravas, ke la ideo forbalai —pafile—tutajn klasojn eĉ se tio signifas murti milionojn da homoj, venas origine de la kapo de Lenin mem, kaj estas taktiko, ne troigo. La kutimo preni dekojn, foje centojn da homoj, kaj vicigi ilin kontraŭ foso kaj pafmortigi ilin, ne estis nazia invento, sed komunisma, same kiel koncentrejoj —la unuaj koncentrejoj kaj ekstermejoj aperis en Sovetunio dudek jaroj antaŭ la unua nazia—. Tiu taktiko kreis komunisman ŝtaton per teroro ĝenerala en Rusio, kaj preskaŭ sukcesis krei ĝin en Hispanio en 1936. Generalo Franko malebligis tion, kaj pro tio maldekstruloj fanatikisme malamas lin kaj lian memoron.

Oni nepre devas legi tiun libron, ĉar oni ne rajtas ignori historion sen endanĝerigi en tio, ke oni ripetos ĝin. La eldonejo estas Belacqua/Caroggio, kaj la kosto estas 21⁸⁴ eŭrojn; kaj la titolo: **Checas de Madrid: las cárceles republicanas al descubierto.**

Isabel Acevedo

¹*ChK venas de Vserossiskaja Chrezvychajnaia Komisia po bor' bes kontr' revoliutsii, spekuliatsei i sabotaguem*, tutrusia eksterordinara komisio por batali kontraŭrevolucion, spekuladon kaj sabotadon.

La Faraono

ĈAPITRO 10^a

Subite la kanto eksilentis, sufokita de la tumulto kaj de la bruo kvazaŭ de multe da kurantoj.

- Idolistoj!... malamikoj de Egipto!... - kriis iu. - Vi kantas, kiam ni ĉiuj dronas en la malĝojo, kaj vi laŭdas la Hebreinon, kiam por siaj sorĉoj haltigas la fluan de Nilo...

- Ve al vi! - kriis alia. - Vi piedpremas la teron de la kronprinco... La morto falos sur vin kaj sur viajn infanojn!...

- Ni foriros, sed eliru la Hebreino al ni, por ke ni prezentu al ŝi nian mizeron...

- Ni forkuru!... - kriis Tafet.

- Kien? - demandis Gedeono.

- Neniam! - respondis Sara, sur kies dolĉa vizaĝo aperis la ruĝo de la kolero. - Ĉu mi ne apartenas al la kronprinco, antaŭ kiu ĉi tiuj homoj falas teren?

Kaj antaŭ kiam la patro kaj servistino povis oponi, ŝi elkuris sur la terason, en sia blanka vesto, kriante al la amaso trans la muro:

- Jen mi estas!... Kion vi volas de mi?...

La bruo ĉesis por unu momento, sed ree eksonis minacaj voĉoj:

- Estu malbenita, fremdulino, kies peko haltigas la akvojn de Nilo!...

En la aero ekfajfis kelke da ŝtonoj, blinde jetitaj; unu trafis la frunton de Sara:

- Patro!... - ekkriis ŝi, kaptante sin je la kapo.

La patro prenis ŝin rapide sur la brakojn kaj forportis de la teraso. En la nokta mallumo oni vidis nudajn homojn en blankaj kufoj kaj antaŭtuko, transirantajn la muron.

Malsupre Tafet kriis ĝis perdo de l' spiro, kaj la sklavo Negro, kaptinte hakilon starigis en la pordo de l' domo, minacante frakasi la kapon al ĉiu, kiu kuraĝos eniri.

- Donu ŝtonojn por ĉi tiu nubia hundo! - kriis al la popolamaso tiuj, kiuj estis sur la muro.

Sed subite la amaso eksilentis, ĉar el la fundo de l' ĝardeno eliris homo kun razita kapo, vestita per pantera felo.

- Profeto!... Sankta patro!... - oni murmuradis en la amaso.

Tiuj, kiuj estis sur la muro, komencis desalti.

- Egipta popolo - diris la pastro per trankvila voĉo - je kiu rajto vi levas la manon kontraŭ la propraĵo de la kronprinco?

- Tie loĝas malpura Hebreino, kiu haltigas Nilon... Ve al ni!... mizero kaj malsato pendas super Malsupra Egipto.

- Homoj de malbona kredo aŭ de malforta saĝo - diris la pastro - kie vi aŭdis, ke unu sola virino povus haltigi la volon de l' dioj? Ĉiujare en la monato Tot Nilo komencas leviĝi kaj kreskas ĝis la monato Hoiack. Ĉu iam okazis alie, kvankam nia lando ĉiam estas plena de eksterlanduloj, iafoje de fremdaj pastroj kaj princoj, kiuj ĝemante en la malfacila laboro de l' malliberuloj povis de kolero kaj ĉagreno ĵeti plej terurajn malbenojn?... Ili sendube deziris faligi sur niajn kapojn ĉiajn malfeliĉojn, kaj pli ol unu, el ili donus sian vivon, por ke la suno ne leviĝu super Egipto, aŭ Nilo ne superverŝu la landon en la komenco de l' jaro. Kaj kia estas la rezultato de iliaj preĝoj?... Aŭ la ĉielo ne aŭskultis ilin, aŭ la fremdaj dioj estis

senfortaj apud niaj. Kiamaniere do virino, kiu estas feliĉa inter ni, povus altiri malfeliĉegon, kian ne povis alvoki niaj plej potencaj malamikoj?

- La sankta patro diras veron!... Saĝaj estas la vortoj de la profeto! - oni kriis en la amaso.

- Tamen Messu, la estro, de Hebreoj, faris mallumon kaj peston en Egipto!... - oponis unu voĉo.

- Kiu diris tion, eliru antaŭen... - diris la pastro. - Mi alvokas lin, li elpaŝu, se li ne estas malamiko de la egipta popolo...

La popolamaso murmuris, kiel vento fluganta de malproksime inter la arboj, sed neniu eliris.

- Vere mi diras - daŭrigis la pastro - ke inter vi rondiras malbonaj homoj, kiel hienoj en la ŝafejo. Via mizero estas por ili indiferenta, sed ili volas igi vin detruu la domon de l' kronprinco kaj ribeli kontraŭ la faraono. Kaj se sukcesus ilia malnobla intenco kaj se el via brusto komencus flui sango, tiuj ĉi homoj sin kaŝus de la lancoj, kiel nun ili sin kaŝas post mia alvoko...

- Aŭskultu la profeton!... Gloro al vi, dia viro!...

- kriis la amaso, klinante la kapojn.

La pli piaj falis teren.

- Aŭskultu min egipta popolo... Pro via kredo al la vortoj de l' pastro, pro la obeo al la faraono kaj kronprinco, pro la respekto al la dia servisto, favoro ekbrilis super vi. Iru en paco en viajn domojn, kaj eble antaŭ kiam vi atingos la malsupron de l' monteto, Nilo komencos leviĝi...

- Tiel okazu...

- Iru!... Ju pli granda estos via kredo kaj pieco, des pli baldaŭ vi ekvidos la signon de la favoro...

- Ni iru!... ni iru!... Estu benata profeto, filo de profetoj...

Ili komencis disiri, kisante la vestojn de l' pastro... Subite iu ekkriis:

- Miraklo!... La miraklo plenumiĝas...

- Sur la turo de Memfiso oni eklumigis la lanternon... Nilo leviĝas!... Rigardu, pli kaj pli multe da lumoj!... Vere, parolis al ni granda sanktulo... Vivu eterne!...

Oni sin turnis al la pastro, sed li malaperis inter la ombroj.

La popolamaso, antaŭ momento ekscitita, poste mirigita kaj plena de dankemo, forgesis sian koleron kaj la pastron, farantan miraklojn. Freneza ĝojo ekregis ĝin kaj ĉiuj ekkuris galope al la rivero, sur kies bordoĵ jam brilis multenombraj lumoj kaj sonis granda kanto de la kunveninta popolo:

- » Saluton al vi, ho Nilo, ho sankta rivero, kiu aperis en ĉi tiu lando! Vi venas en paco por doni la vivon al Egipto. Ho kaŝita dio, kiu dispelas la mallumojn, kiu surverŝas la herbejojn por doni nutraĵon al la mutaj bestoj! Ho vojo, iranta malsupren de l' ĉielo por sensoifigi la teron; ho amiko de l' pano, vi kiu ĝojigas la domojn!... Vi estas estro de l' fiŝoj kaj kiam vi malsupreniras sur niajn kampojn, neniu birdo kuraĝas tuŝi niajn rikoltojn. Vi kreas la grenojn kaj naskas la hordeon; vi donas ripozon al la manoj de milionoj da malfeliĉuloj kaj por eterne firmigas la templojn.« [Aŭtentika]

En la sama momento la lumigita ŝipeto de la kronprinco alboldiĝis, inter krioj kaj kantoj. La samaj, kiuj antaŭ duonhoro volis penetri superforte en la domon de l' kronprinco, nun falis sur la vizaĝo, aŭ sin ĵetis en la akvon por kisi la remilojn kaj flankojn de l' ŝipeto, kiu alportis la kronprincon.



Gaja, ĉirkaŭita de torĉoj, Ramzes akompanata de Tutmozis eniris en la domon de Sara. Ekvidinte lin, Gedeono diris al Tafet:

- Mi tre timas pri mia filino, sed ankoraŭ pli mi timas renkonti ŝian sinjoron...

Li transsaltis la muron kaj en la mallumo, tra la ĝardeno kaj kampoj, iris al Memfiso.

Sur la korto Tutmozis kriis:

- Saluton, bela Sara!... Mi esperas, ke vi bone akceptos nin pro la muziko, kiun mi sendis al vi.

Sur la sojlo aperis Sara kun bandaĝita kapo, apogita sur la Negro kaj servistino.

- Kion tio signifas? - demandis la kronprinco kun mirado.

- Terurajn aferojn!... - ekkriis Tafet. - La idolistoj atakis vian domon, kaj unu ekbatis Saran per ŝtono!

- Kiuj idolistoj?

- Tiuj... Egiptanoj! - klarigis Tafet.

La kronprinco jetis al ŝi rigardon, plenan de malestimo. Sed tuj ekregis lin furiozo.

- Kiu ekbatis Saran?... kiu jetis la ŝtonon?... - kriis li, kaptante la Negron je la brako.

- Tiuj de la bordo de l' rivero... - respondis la sklavo.

- Ĉi tien gardistoj! - kriis la ŝaŭmanta princo. - Armu ĉiujn servistojn de la bieno kaj kontraŭ la kanajloj!...

La Negro ree kaptis sian hakilon, oni vokis la servistojn el ĉiuj konstruaĵoj, kaj kelke da soldatoj de la princa sekvantaro mehanike, ordigis la glavojn.

- Ho Dio, kion vi volas fari?... - murmuretis Sara, sin pendigante ĉe la kolo de l' kronprinco.

- Mi volas vin venĝi... - respondis li. - Kiu batas mian proprajon, batas min mem.

Tutmozis paliĝis kaj balancis la kapon.

- Aŭskultu sinjoro - diris li. - Kiamaniere nokte vi trovos en la popolamaso tiujn, kiuj plenumis la krimon?

- Tio estas indiferenta por mi... La popolaĉo tion faris kaj la popolaĉo estos punita...

- Tion dirus neniu juĝisto - klarigis Tutmozis. - Kaj vi devas iam esti la plej alta juĝisto...

La princo ekmeditis, lia kunulo daŭrigis:

- Konsideru, kion morgaŭ dirus nia sinjoro, la Faraono?... Kaj kia ĝojo ekregus inter la malamikoj de Egipto, de l' Oriento ĝis la Okcidento, se ili ekaŭdis, ke la kronprinco, preskaŭ apud la reĝa palaco, atakas nokte sian popolon?...

- Oh, se la patro donus al mi almenaŭ duonon de la armeo, eksilentus por eterne niaj malamikoj en ĉiuj partoj de l' mondo!... - murmuretis la princo, piedbatante la teron.

- Fine... rememoru la homon, kiu sin pendigis... Vi bedaŭris, ke mortis senkulpa homo, kaj hodiaŭ... Ĉu tio estas ebla, ke vi mem volas mortigi senkulpajn?...

- Sufiĉe jam!... - interrompis surde la kronprinco. - Mia kolero estas kiel kruĉo plena de akvo... Ve al tiu, sur kiu ĝi elverŝiĝos... Ni eniru en la domon...

Tutmozis terurita foriris. La princo prenis Saran je la mano kaj suriris kun ŝi la unuan etaĝon. Li sidigis ŝin ĉe la tablo, sur kiu restis ankoraŭ la nefinita vespermanĝo kaj proksimiginte la kandelington li deŝiris de l' frunto la bandaĝon.

- Ah? - ekkriis li - tio eĉ ne estas vundo, nur kontuzo. Li atente rigardis Saran.

- Mi neniam pensis, ke vi povus havi kontuzon... Tio tre aliigas la vizaĝon...

- Mi do ne plaĉas plu al vi?... - mallaŭte demandis Sara, levante al li siajn grandajn okulojn, plenajn de timo.

- Ah, ne!... cetere tio pasos.

Poste li alvokis la adjutanton kaj la sklavon kaj ordonis al li rakonti la okazaĵojn de la vespero.

- Li nin defendis - diris Sara. - Li stariĝis en la pordo kun la hakilo.

- Vi faris tion?... - demandis la princo la sklavon, fikse rigardante liajn okulojn.

- Ĉu mi devis permesi al fremduloj superforte eniri en vian domon, sinjoro?

La princo karesis la krispan kapon de l' sklavo.

- Vi agis - diris li - kiel brava homo. Mi donas al vi la liberecon. Morgaŭ vi ricevos rekompencon kaj vi povos reveni al la viaj. La Negro ekŝanceliĝis kaj frotis siajn okulojn, kies blanko brilis. Subite li falis sur la genuojn kaj frapante la plankon per la frunto, ekkriis:

- Ne forpelu min de vi, sinjoro!...

- Bone - respondis la kronprinco - restu ĉe mi, sed kiel libera soldato. Guste tiajn homojn mi bezonas - aldonis li, rigardante al Tutmozis.

- Li ne scias paroli, kiel gardisto de l' domo de libroj, sed estas preta batali...

Kaj ree li komencis demandi pri la detaloj de la atako, kaj kiam la Negro rakontis al li pri la apero de la pastro kaj pri la miraklo, la princo sin kaptis je la kapo kriante:

- Mi estas la plej malfeliĉa homo en Egipto!... Baldaŭ eĉ en mia lito mi trovados pastrojn... De kie li estas?... Kiu li estas? Tion la Negro ne povis klarigi. Li diris nur, ke la konduto de la pastro estis tre bonvola por la princo kaj Sara; ke la atakon direktis ne Egiptanoj, sed homoj, kiujn la pastro nomis malamikoj de Egipto kaj kiujn li vane alvokis eliri el la popolamaso.

- Strange!... Strange!... - diris la princo meditante kaj jetis sin sur la liton. - Mia nigra sklavo estas brava batalisto kaj homo plena de prudento... Pastro defendas Hebreinojn, ĉar ŝi estas mia?... La egipta popolo, kiu ekgenuas antaŭ la hundoj de l' faraono, atakas la domon de l' kronprinco, sub la komando de iaj malamikoj de Egipto?... Mi mem devas tion esplori...



Kajeroj

el la Sudo



**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ
ESPERANTISTAJ (HALE)**

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 658
E30080 MURCIA, 166 323
HISPANIO**

**Retskribu al
jesuo@ono.com**

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://storm.prohosting.com/jesuo> Esperanto@iespana.es

La Statuto de SAT

**Kontrolu la numerojn 50^{an} al 58^a por
legi la Statuton de SAT.**

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Ankaĉus'.